

Votre revue de l'Association Pour l'Espéranto

N° 4 - 2016

Espéranto
en
Marche



NE FORGESU JAM REKOTIZI AL APE POR 2017 !

Vi povas pagi al la konto BE72 000 3258537 16, pere de la kunmetita ĝirilo !
(MEM : 10 € FAM : 3 € BUL : 7 €)

AGRABLAJN FINJARAJN FESTOJN !!
FELIĈAN NOVAN JARON 2017 !

Enhavo

- Paĝo 2 : Raporto de la Ĝ.A. de APE en MONTZEN (15/10/2016).
- Paĝo 3-4 : Raporto de la kasisto / eldonisto / bibliotekisto. Abonoj.
- Paĝo 5-6 : U.K. en SEULO (22-29/07/2017) : ALIĜILO.
- Paĝo 7-8-9 : Signolingvo(j): malbone konataj faktoj..
- Paĝo 10-11 : E. AISBERG : « Mi komprenas fine la radion » 1-a pĝ.
- Paĝo 12 : Raporto pri la agadoj de la Verdaj Skoltoj.
- Paĝo 13 : PEKO 2017 : 24-26-an de marto 2017 en Amougies.
- Paĝo 14 : Informoj pri Esperanto en Belgio kaj Internacie
- Paĝo 15 : Informoj pri Esperanto en Valonio.
- Paĝo 16 : Kotizoj 2016 por APE kaj UEA. Abono al Eo-Info.

Editeur responsable: Claude Glady
Rue du Culot, 1 BE-5630 CERFONTAINE BELGIO
00-32-(0)71/64 49 16 cglady@arcadis.be

ASSEMBLEE GENERALE DE L'ASSOCIACION POUR L'ESPERANTO (A.P.E.) DU 15 OCTOBRE 2016 A MONTZEN.

Ouverture de la séance par la secrétaire Bernadette PONCELET à 14 h.00

Comité d'Administration :

- - présents : Bernadette PONCELET – Claude GLADY – Valère DOUMONT – Hubert DEMEYERE
- - excusée : Mireille MARNETTE
- - absents : Marcel DELFORGE – Georges SOSSOIS – Patrice VAN DE VELDE

Membres Effectifs :

- - procuration : Jean-Pol SPARENBERG – Michèle VILLERS
- - absents : Guy BASYN – Albéric JACMART – Philippe DE VOS

Membre A.P.E. :

- - présent : Paul KERRIS

Grâce aux deux procurations et la dualité des membres du Comité d'Administration dans les Membres Effectifs, le quorum est atteint de justesse.

Le Procès Verbal de l'Assemblée Générale du 18 octobre 2016 à Cerfontaine est approuvé.

Le trésorier Claude GLADY lit et commente son rapport financier qui est approuvé. Les vérificateurs aux comptes Jean-Pol SPARENBERG et Paul KERRIS rendent leurs rapports d'approbation de la comptabilité du trésorier.

Le groupe de Charleroi (Karloregô K.G.E) représenté par Hubert DEMEYERE présente son rapport d'activité qui doit être envoyé à la secrétaire Bernadette PONCELET.

La secrétaire lit le rapport du Groupe de Liège envoyé par Denise MAILLET qui excuse son absence par son grand âge.

Le rapport de Verviers est présenté comme exemple pour la demande de subside.

Le rapport de Bernadette PONCELET et Paul KERRIS n'appartenant à aucun groupe est rendu.

Les Verdaj Skoltoj rendent aussi leur rapport d'activité par Valère DOUMONT.

Il sera très apprécié que les articles à paraître dans la revue soient envoyés à Claude GLADY (cglady@arcadis.be).

C'est toujours Hubert DEMEYERE qui s'occupe du site internet.

Il est décidé de supprimer les coordonnées de KOMUNIKADO et des Villes Wallonnes des contacts car ils n'existent plus.

Le vérificateur aux comptes Paul KERRIS sortant est remplacé par Valère DOUMONT.

Comme demandé après l'invitation à l'Assemblée Générale, Bernadette PONCELET accepte de représenter l'A.P.E. Au Conseil d'Administration des Verdaj Skoltoj.

Vu le grand nombre d'absents aucune autre décision n'est prise.

La séance se clôture à 16 h.30

La secrétaire,

RAPPORT DU TRESORIER/EDITEUR/BIBLIOTHECAIRE.

LA SITUATION FINANCIERE :

Pour les recettes, on a essentiellement les cotisations (MEM, FAM, BUL), les subventions et un peu de soutien. Il y a aussi de fausses rentrées puisqu'il s'agit d'abonnements à rembourser.

Les dépenses régulières sont pour le Bulletin, les paiements à l'UEA et l'EEU, le site d'APE et les frais bancaires.

Le bilan financier pour 2015-2016 présente un mali de 115,06 €. Il faut cependant relativiser un peu ce résultat, étant donné une importante dépense de 558,86 € pour l'achat d'un ordinateur. Sans cette dépense, nous pourrions parler de léger boni, ou en tout cas, considérer que nos dépenses semblent plus ou moins égaler nos recettes. Car nous devons encore payer notre participation à l'UEA pour 2016 (64 €) et rembourser deux ou trois Bulletins EeM.

Dans ces conditions, faut-il modifier la cotisation demandée de 10 € ? Je crois que tant que nous ne pourrons pas fournir régulièrement une revue de qualité, c'est une somme suffisante pour remplir nos obligations et demander plus risquerait encore de diminuer le nombre de membres payants.

Au 30 juin 2016, APE avait 60 membres cotisants : 55 MEM et 5 FAM. C'est peu !! Pour ramener des anciens membres qui ont cessé de payer, j'ai effectué plusieurs rappels par internet ou par envoi gratuit d'un Bulletin.

Avec finalement peu de résultat.

Quelqu'un à-t-il une idée pour augmenter le nombre de membres ? Je suis tout ouïe.

CONCERNANT LA REDACTION ET L'EDITION DU BULLETIN :

42 membres ont payé pour recevoir le Bulletin d'information « Espéranto en Marche » sous forme papier. Cela semble montrer un certain intérêt pour ce Bulletin, qui doit effectivement être considéré comme un organe de liaison, mais, étant donné l'absence d'une véritable équipe de rédaction, il n'a aucune prétention littéraire et reste un simple Bulletin d'informations.

J'essaie de trouver et de rédiger des informations intéressantes, mais un peu plus d'aide des autres membres serait la bienvenue. Même si cela ne reste qu'un Bulletin de liaison, il nous sert tout de même à nous faire connaître du monde extérieur, car j'envoie gratuitement le Bulletin à de nombreux responsables, parfois jusqu'en Russie, Chine et Brésil.

Quelques temps après l'envoi des Bulletins, celui-ci devient disponible sur notre site en format A4 couleur et est consultable librement par tous.

Cela aussi nous sert de publicité auprès des autres organisations. Il est donc normal qu'une partie des frais d'édition soit reprise par les cotisations.

J'espère toujours que l'on puisse trouver une nouvelle équipe pour éditer un vrai Bulletin, mais ces oiseaux rares sont difficiles à dénicher. Sinon, c'est avec plaisir que je leur confierais cette tâche.

Dans le cas contraire, je continuerai à essayer d'éditer 4 numéros par an.

Une fois que la composition du Bulletin est terminée (en format publisher), l'impression, l'assemblage, la mise sous étiquettes des adresses, les timbres et l'envoi, tout peut se faire en une journée.

Sauf pour les numéros de rappel pour cotisation, j'imprime actuellement septante numéros de 12 ou 16 pages A4, ramenées au format normalisé de la Poste, afin de diminuer le prix des timbres pour les envois.

A PROPOS DE LA BIBLIOTHEQUE.

Elle contient plusieurs milliers de livres, de documents divers, et de revues, certaines en collection. A la Bibliothèque d'APE, j'ai ajouté tous es livres de ma propre bibliothèque.

Je rappelle que ces livres sont à la disposition de tous dans le grenier de mon domicile.. Je peux faire parvenir une liste provisoire de plus de 1000 ouvrages en format pdf par courriel, sur demande.

Je signale aussi que la Bibliothèque fait appel à tous pour la compléter et surtout nous prévenir pour empêcher que des ouvrages rares ne se retrouvent sur la poubelle, par exemple lors de décès..

Il restera quand même le gros problème, pour savoir (?) où placer tous ces documents lorsque je rejoindrai l'état de poussière ! Espérons que ce ne soit pas pour demain.

Claude Glady


**Tiuj revuoj estas mendeblaj ĉe FEL : Lange Beeldekenstraat 169 2060 Antverpeno
Rete : info@fel.esperanto.be Tel : 03 234 34 00 konto : BE66 0000 2653 3843**

p	Horizontaal (gratis voor leden)		30,00 EUR EUR
		<input type="checkbox"/> rete	25,00 EUR EUR
m	Monato		56,00 EUR EUR
em	Ret.Monato Ascii/Unicode/PDF/ePub		33,60 EUR EUR
a	Agenda La Jarox	6,00 EUR EUR
e	Esperanto		41,00 EUR EUR
ja	Juna Amiko	<input type="checkbox"/> rete <input type="checkbox"/> mare	11,00 EUR / 18,00 EUR EUR
oe	La ondo de Esperanto (rete)		15,00 EUR EUR
gz	La Gazeto		32,00 EUR EUR
kk	La Kancerkliniko		27,50 EUR EUR
k	Kontakto		25,00 EUR EUR
h	Heroldo de Esperanto (12 foje jare)			
		<input type="checkbox"/> rete <input type="checkbox"/> mare	29,00 EUR / 59,00 EUR EUR
if	Literatura Foiro (6 foje jare)		45,00 EUREUR
ipr	ILEI + Internacia Pedagogia Revuo		22,00 EUR EUR
eipr	ILEI + Internacia Pedagogia Revuo reta versio		12,00 EUR EUR
ikef	IKEF (libervola kontribuo)		 EUR
ek	IKUE + Espero katolika		30,00 EUR EUR
nu	INOE + Naturista vivo		15,00 EUR EUR
tv	TEVA + Esperantista vegetarano		20,00 EUR EUR

ALIĜILO

SEULO

102-a UNIVERSALA
KONGRESO
DE ESPERANTO
22 - 29 julio 2017
Seulo, Korea Resp.



Konstanta adreso:

102-a UK de Esperanto
Nieuwe Binnenweg 176
NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando
www.uea.org (eblas aliĝi ankaŭ rete)

Kongresa numero:

ĈIU ALIĜANTO UZU APARTAN ALIĜILON, FOTOKOPION AŬ SAMFORMATAN PAPERON – BONVOLU
TAJPI AŬ SKRIBI PRESLITERE. LAŬBEZONE METU KRUCON EN LA KONCERNAJN KVADRATETOJN.

FAMILIA NOMO VIRO/VIRINO
(por alfabeto ordigo) (forstreku la nevalidan)

PERSONA(J) NOMO(J) UEA-KODO -

ADRESO (nacilingve en latinaj literoj kun poŝtkodo)

LANDO TEL. (kun prefikso)

NASKIĜDATO RETADRESO

Mi aliĝas al la Kongreso laŭ la kondiĉoj presitaj sur la dorsa flanko. (Aliĝojn sen kotizpago oni ne traktas.)

Mi sendas ĉi tiun aliĝilon al mia landa peranto kaj samtempe pagas al tiu (vidu dorse sube).

Mi sendas ĉi tiun aliĝilon al la CO en Roterdamo kaj pagas laŭ suba specifo:

al ABN-Amro-konto en la nomo de la UK (aldonante 10 eŭrojn, el EU-landoj sen kostoj),
IBAN-kodo: NL86 ABNA 0426 9014 44, SWIFT(BIC)-kodo: ABNANL2A.

per Visa/Amex/Mastercard n-ro valida ĝis

! Visa- kaj Mastercard-kontrolnumero (tri ciferoj, dorse de la karto)

al la bankokonto de UEA (bv. cirkligi) en Belgio: IBAN: BE54 0001 6318 3197, BIC: BPOTBEB1XXX; Germanio: IBAN: DE51 3701 0050 0318 2915 09, BIC: PBNK-DEFF; Svedio: IBAN: SE95 9500 0099 6042 0074 3740, BIC: NDEASESS; Svislando: IBAN: CH86 0900 0000 1200 2310 0, BIC: POFICHBEXXX.

per PayPal (interreta pagsistemo; al financoj@co.uea.org).

bonvolu debeti al mia UEA-konto, kie estas sufiĉa bonhavo.

Bv. aperigi en la Kongresa Libro mian retadreson anstataŭ mia poŝta adreso.

Mi ne volas ke adreso mia, poŝta aŭ reta, aperu en la Kongresa Libro.

Mi ne volas ricevi la paperan Duan Bultenon (mi legos ĝin en la UK-retejo).

Se vi aliĝas kiel kunulo, bv. ĉi tie indiki la nomon/kodon de la ĉefaliĝinto:

Se vi aliĝas kiel handikapulo, ĉu UEA jam havas atestilon? jes / mi kunsendas (forstreku unu)

Se vi aliĝas senpage, bv. skribi ĉi tie la kialon (vidu dorse):

Mi legis, komprenas kaj akceptas la kondiĉojn presitajn dorsflanke sur ĉi tiu aliĝilo.

DATO SUBSKRIBO

Por uzo de la administracio/peranto:		KOTIZO (vidu dorse)
UEA-membro en kategorio/jaro		DONACO AL KONGRESO
UEA-spezfolio n-ro:		INFANA KONGRESETO
konfirmo de peranto:		FONDAĴO CANUTO
PAGO EN CO	KONFIRMO	TRIAMONDA FONDAĴO
notoj		KOSTOJ (10 eŭroj)
		ENTUTE (en eŭroj)

La kotizoj varias depende de la loĝlando de la aliĝanto, laŭ la jena grupigo:

A: Ĉiuj landoj escepte de tiuj de kategorio B.

B: Iamaj socialismaj landoj de Eŭropo; ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Resp.), Afriko kaj Latina Ameriko.

La kotizoj estas pagendaj al la konstanta adreso aŭ al landa peranto (vidu liston en la Unua Bulteno, aŭ en la reto ĉe www.uea.org/alighoj/perantoj; ankaŭ pluraj aliaj informoj pri la Kongreso aperas en la UEA-paĝoj). **La CO en Roterdamo akceptas aliĝilojn ĝis la 15-a de junio 2017. Post tiam, oni aliĝu surloke dum la UK.**

POR ELEKTI LA ĜUSTAN KOTIZON BV. ATENTE LEGI LA ĈI-PAĜAJN KLARIGOJN.

KONGRESKOTIZOJ VALIDAJ: (ĉiuj en eŭroj)	ĝis 31 dec. 16 1-a periodo		ĝis 31 marto 17 2-a periodo		ekde 1 aprilo 17 3-a periodo	
	A	B	A	B	A	B
1. individua membro de UEA (vidu sube ĉe "Difinoj"):	180	135	225	170	270	205
2. ne individua membro de UEA	225	170	280	210	340	255
3. komitatano/kunulo/junulo/handikapulo, mem individua membro de UEA	90	65	115	80	135	95
4. kunulo/junulo/handikapulo, ne individua membro de UEA	135	100	170	125	205	150

DIFINOJ (La kategorioj povas ŝanĝiĝi en 2017 - Nepre konsultu ĉe uea.org/kongresoj/alighilo)

Individua membro de UEA: Dumviva Membro (DM aŭ DMJ), Membro kun Jarlibro (MJ aŭ MJ-T), Membro-Abonanto (MA aŭ MA-T). *Aligitaj Membroj kaj Membroj kun Gvidlibro (MG) eniras kategorion 2 (ne individua membro de UEA), kiam temas pri la kongresa kotizo.*

Komitatano: Tiu, kiu estas membro aŭ observanto en la Komitato de UEA en la momento de aliĝo.

Kunulo: Tiu, kiu loĝas samadrese kun la ĉefaliĝinto. Ĉefaliĝinto oni konsideras personon, kiu pagas kotizon en kategorio 1 aŭ 2.

Junulo: Tiu, kiu naskiĝis inter 87 01 01 kaj 96 12 31 (inkluzive). Oni nepre notu la naskiĝdaton sur la aliĝilo kaj sendu kopion de identigilo kie aperas la naskiĝdato.

Handikapulo: Tiu, kies handikapo nepre postulas akompananton (ekzemple blindulo), kaj kiu pruis tion per kuracista aŭ simila atestilo, kiu klare indikas la tipon de handikapo.

Senpage aliĝas:

- infanoj kaj gejunuloj naskiĝintaj post 96 12 31 (sendi kopion de identigilo kie aperas la naskiĝdato);
- nemalhaveblaj akompanantoj de handikapuloj.

La kotizo ne estas repagebla, senkonsidere ĉu la aliĝinto ne povas partopreni la Kongreson pro propra volo aŭ pro iu ajn ekstera kaŭzo, eĉ se la Kongreso ne okazas, aŭ okazas en alia urbo.

La kotizo ne inkluzivas loĝadon, ekskursojn, bankedon kaj eventuale aliajn aparte pagendajn aferojn pri kiuj informoj kaj mendiloj aperas en la Dua Bulteno. La kotizo inkluzivas nenian asekuron.

Kongresaneco ne estas transdonebla al alia persono.

Por la limdatoj kaj aliaj kondiĉoj validas la dato de ricevo de la pago en la CO aŭ ĉe peranto. Aliĝilon sen kompleta pago oni ne traktos.

Kongresa Regularo (ekstrakto): "8. Kongresanoj devas fari nenion, kio kontraŭas la Kongresan Regularon, aŭ malutilas al la UK, kaj devas submetiĝi al la leĝoj de la lando, kie okazas la UK."

Kiu subskribas ĉi tiun aliĝilon, konfirmas sian respekton al la Kongresa Regularo kaj la laŭstatuta neŭtraleco de UEA, kiu organizas kaj aŭspicias la Universalajn Kongresojn.



Se vi pagas al peranto, bonvolu sendi ankaŭ la aliĝilon al tiu.

Se vi pagas rekte al konto de UEA, sendu la aliĝilon al Roterdamo.

LA SIGNOLINGVO

Zamenhof, proponis la internacian lingvon « Esperanto », esperante ke, ĝi estonte fariĝu la universala helplinvo, kiu permesos al ĉiu homo komuniki kun la tuta mondo, konservante sian propran lingvon sen diskriminacio.

Ĉe la surdamutuloj, ĉiuj scias kaj vidas ke, ili kapablas komuniki per signolingvo. Sed, kurioze, mi estas certa ke multaj homoj opinias, ke ili uzas signolingvon kiu estas universala, la sama en la tuta mondo. Fakte ĝi do estus iom simila al ia « Esperanto ». Kaj ankaŭ verŝajne, vi estas konvinkita, ke tiu signolingvo estas oficiale agnoskita de ĉiuj landaj registaroj, apogita de Unuiĝintaj Nacioj, depost multaj jaroj.. Plie, eble vi ankaŭ opinias, ke konsiderante la bezonon por la surdamutuloj kiuj nur tiel povas komuniki, estis evidente, ke la uzpermeso de iu signolingvo estis facile akceptita de la lernigaj instancoj, kaj ke ne povis ekzisti kontraŭuloj kiuj malfaciligis tiun utilan uzon kaj propagadon.

Fakte, tiuj tri opinioj estas tute malveraj, kiel vi povos konstati en la sekvo de tiu teksto ! Kiel Esperanto, signolingvoj renkontis malfacilaĵojn !

La signolingvo ne estas universala ! Ĝi malsimilas laŭ la diversaj landoj. Eĉ en Belgio, ekzistas du signolingvoj, unu por la francparolantoj (LSFB) kaj unu por la nederlandparolantoj (VGT : Vlaamse Gebarentaal) , sen paroli pri kelkaj lokaj dialektoj. Kaj la belgaj francparolantoj ne uzas la signolingvon de la francoj (LSF), kaj la belgaj nederlandparolantoj tiun de la nederlandanoj (NGT) ; Sen paroli pri kelkaj lokaj dialektoj. Vidu Vikipedion: En la regiono de Marsejlo, estas uzata de ĉ. 1000 parolantoj, la Marsejla signolingvo. Se oni parolas pri ĉ. 221 malsimilaj signolingvoj en la mondo, oni konstatas aktuale, en la internaciaj rilatoj, ke same kiel okazis kun la angla lingvo, la usona signolingvo (ASL) pli kaj pli sin imponas !

Evidente, la surdamutuloj tamen kapablas facile interkompreniĝi kiam ili havas la saman gepatran lingvon. Kaj pro historiaj kialoj, oni konstatas multe da simileco inter tiuj diversaj signolingvoj. Sed la diferenco estas pli granda kiam temas pri malsimilaj lingvoj, precipe gramatikaj diferencoj.. Ankaŭ malsamaj korpaj sintenoj, per la buŝo, la vizaĝo aŭ per la lipoj, kreas malfacilaĵojn por sin kompreni. Ni ne forgesu, ke ekzemple por diri jes aŭ ne per la kapo, bulgarioj kaj belgoj uzas malajn movojn.

Pri la alfabeto ekzemple, por montri literon, oni povus esperi universalan liston, kiel tio ekzistas en la Morsa alfabeto. Sed eĉ la simpla alfabeto ne estas vere universala : se en nia lando, ni uzas por unu litero, unu manon, aŭ la dekstran aŭ la maldekstran, la britoj bezonas uzi la du manojn samtempe. Kaj kiamaniere alfabetumi por la tona ĉina lingvo kiu bezonas proprajn sonojn kiel zh kaj ng ?

Ankaŭ por la ciferoj ekzistas malsimilaĵojn : Por indiki la ciferon « unu », la signolingvoj francaj, italaj kaj danaj uzas la polekson (dikfingron), sed la britaj, svedaj kaj finnaj, la montrofingron !

La signolingvo ne posedas konjugacion : ĝi situigas la agon sur tempolinio : malantaŭ la parolanto por la estinto, je nivelo de la korpo por la estanto, kaj antaŭ la parolanto por la estonto. Krom litero kaj cifero, iu signo povas signifi tutan vorton (ekz : ĉevalo, sed ĝi tute malsimilas por francoj kaj angloj ekzemple), aŭ eĉ tutan frazon (Mi amas vin). Ĝi ne estas lineara kiel natura lingvo, ĝi permesas kelkfoje esprimi plurajn ideojn samtempe, kvazaŭ space laŭ tri dimensioj.

La nivelo de la agnosko de la signolingvo tre malsimilas laŭ la landoj kaj ĝi estas ofte freŝdata ! Nur kelkaj estas leĝe agnoskitaj, multaj malhavas oficialan statuton. La Eŭropa Parlamento aprobis rezolucion en junio 1988, petante al ĉiuj eŭropaj ŝtatoj agnoski sian signolingvon kiel oficialan signolingvon de la surdamutuloj. La signolingvo de la belgaj francparolantoj (LSFB) estis nur agnoskita per dekreto en oktobro 2003 far la Parlamento de la Franclingva Komunumo de Belgio (CFB). kaj la flandra signolingvo (VGT) en aprilo 2006 far Flandra Parlamento. En Finnlando, tiu agnosko estas eĉ en la Konstitucio depost 1995.

Ĉu la lernigaj instancoj por helpi la surdamutulojn facile konsentis tuj instrui larĝskale la proponitajn signolingvojn ? La franca malpermeso in 1880 pruvas ke ne ! Evidente, signoj por interkomuniki estas tiel maljuna kiel la homa historio, kaj ne necesigas lernejon ! Sed la instruo de vera signolingvo komencis nur en la 16-a jarcento kun Pedro Ponce de Léon, hispana abato, kiu fondis veran lernejon por la surdamutuloj. La angla alfabeto kun la du manoj aperis en 1698. En Francio, en 1771, la abato Charles-Michel de l'Épée starigas la unuan senpagan institucion en Parizo por la surdamutuloj. Antaŭe la surduloj uzis inter si, iun malnovan francan signolingvon (VLSF) kiu estis malaprobata de la klerigaj instancoj. Sed fakte, de l'Épée ne konsideris ke la signolingvo (VLSF) estas kompleta lingvo kun propra gramatiko kiu malsimilas al la parola franca lingvo , kaj fakte klopodis, bonintence, transformi ĝin en signita franca lingvo pli proksima de la natura lingvo. Pro tio, li konstatis ke fakte, la surdamutuloj devis uzi du malsamajn signolingvojn laŭ la cirkonstancoj. Sed la oponentoj al tiu « signismo », kiuj defendis la oralismajn metodojn por favorigi la akceson al la parola komunikado, finfine sukcesis obteni la malpermeson de la signolingvo en ĉiuj specializitaj lernejoj en 1880. Nur en 1991, Francio oficiale agnoskis rajton al dulingvismo por la surdomutuloj.

Ĉu povos tamen baldaŭ aperi universalan signolingvon ? Ekzistis propono de universala signolingvo nomita « GESTUNO ». Sed verdire, ĝi renkontis ĝis nun malmulte da sukceso. Sed la mondaj instancoj de la surdamutuloj klopodas de longe unuigi la diversajn signolingvojn, profitante la multnombrajn similecojn. Plie, pro la nuntempa ekonomia potenco de la usonaj instancoj, la usona signolingvo (ASL) ricevas pli kaj pli tutmondan agnoskon, despli ke tiu signolingvo estis tre influita far eŭropaj signolingvoj, precipe la franca (LSF).

TREZORO DE NIA BIBIOTEKO

« MI KOMPRENAS FINE LA RADION! »

Amuza kaj populara enkonduko en la radioteknikon

Originale en Esperanto verkis: Eŭgeno Aisberg

La bildojn desegnis: H. Guilhac Literatura Mondo, Budapest 1934

Eŭgeno Aisberg, rusdevena franco, okupis elstara posteno en la mondo de la radio. Tiu libro poste estis eldonita en multajn Lingons, en la franca sub la titolo : »La Radio mais c'est très simple ». Tiu libro estis ofte la unua libro de la estontaj elektronikistoj. Ni ne forgesu, ke Esperanto multe aperis ĉe la franclingvaj prauzantoj de la radio.

La tuta libro estas nun elŝutebla ĉe la retpaĝo de EVENTOJ :

<http://www.eventoj.hu/steb/ingxenierado/telekomuniko/aisberg/radio00.htm>

SCIEMULO : junulo 15-jara, kies soifo al scio estas nekontentigebla. Li havas apenaŭ iajn fizikajn kaj kemiajn konojn. Cetere li estas sagaca knabo. Ni havos okazon lin bone ekkoni dum la lego de la babiladoj kun li.

RADIULO : onklo de Sciemulo, 35 jara, radio-inĝeniero, iom sarkasma, sed kun neŝancebla trankvilo, sen ia signo pri gravmieneco. Eble iom oportunemaj, sed ĉiuokaze tre ideala onklo, kian la verkinto deziras al ĉiu sia leganto per tuta koro.

UNUA BABILADO : Sciemulo komencas kompreni

En la unua babilado, la aŭtoro skizas per plej ĝeneralaj trajtoj la principon de la radiokomuniko. Al tiu tre ĝenerala skizo pluaj detaloj estos aldonitaj en la sekvantaj babiladoj, kreante iom post iom la veran bildon de la radio.

Samtempe, en la ĉi-suba babilado, la leganto trovos necesajn sciojn el la moderna elektrona teorio kia faciligos al li mirinde la komprenon de ĉiuj klarigotaj radiofenomenoj.

Sciemulo respondas sincere

SC. Diru, onklo, kiel funkcias la Telefonio sen Fadenoj?

RAD. Ho, Sciemuĉjo, estas tro longe tion klarigi, des pli, ke vi nenion scias pri elektro. Tamen principe la afero prezentiĝas jene. En unu punkto de la terglobo ni havas metalfadenon, nomatan anteno, en kiu per specialaj aparatoj estas produktata alterna kurento de alta frekvenco. Tiu kurento siavice produktas en la ĉirkaŭa etero vibradon, kiu disvastiĝas en formo de elektromagnetaj ondoj. En alia loko ni havas ricevan antenon, en kiu la alvenantaj ondoj aperigas altfrekvencajn kurentojn, kies ekzisto povas esti malkovrita, per speciale aranĝitaj aparatoj. Nun vi komprenis?

SC.Nenion!!

RAD.Mi tion supozis. Mi vidas, ke mi devas plidetaliĝi mian klarigon. Do...

Interesaj ludoj

SC. Mi volus unue scii, kio estas elektra kurento.

RAD. En la sciencaj libroj ĝi estas difinita kiel transporto de elektro, sed ...

SC.... Sed mi ja ne scias, kio estas elektro!

RAD. Tute ĝuste! Diru al mi, ĉu vi scias kio estas atomo?

SC. Ho jes! Vi tion jam rakontis al mi. Atomo estas la plej malgranda ero de materio.

RAD. Bone! Sed mi ne rakontis al vi, ke la atomo mem konsistas el ankoraŭ pli malgrandaj eretoj.

SC. Pardonu, onklo. Vi ja antaŭe diris, ke la atomo estas nedividebla: kaj mi kredas tion, ĉar ĝi estas tre malgranda.

RAD. Estas mia kulpo: mi estis devigita iom mensogi, por ke vi prezentu al vi pli klare la aferon. Antaŭe oni tiel pensis. Certe la atomo estas tre malgranda. Ekzemple, unu gramo da hidrogeno enhavas 600 000 000 000 000 000 000 000 000 atomojn. Sed antaŭ kelkaj jaroj la fama fizikisto Rutherford pruvis, ke la atomoj ĝenerale prezentas sufiĉe komplikan aron da ankoraŭ pli malgrandaj eroj, kiujn oni nomas elektronoj kaj protonoj. La atomo ja tre similas nian sunsistemon kun ĝia centro-suno kaj turniĝantaj ĉirkaŭ ĝi planedoj. En la centro de la atomo, anstataŭ la suno, ni havas grupon da protonoj kaj da elektronoj. Ĉirkaŭ tiu grupo, formanta la kernon de l' atomo, turniĝas je diversaj distancoj la elektronoj. Ĝenerale la nombro da elektronoj kaj protonoj estas egala (fig 1).

SC. Tio similas ankaŭ la ludon, laŭ kiu aro da knabinoj staras en la mezo kaj sama nombro da knaboj kuras ĉirkaŭ ili kaj kantas.

RAD. Bela ekzemplo! Des pli bela, ke ankaŭ la »psikologio« de elektronoj kaj protonoj similas tiun; de geknaboj. Ili en siaj emoj sekvas jenan regulon: la elektronoj kaj la protonoj estas reciproke altirataj; sed elektronoj ne amas elektronojn kaj ilin forpuŝas; same protonoj forpuŝas protonojn.

SC. Mirinde! Tute simile niaj malsaĝaj knabaĉoj ŝatas amindumi la knabinojn kaj ofte, konkurante unu kun la alia, forte disputas. Ankaŭ la knabinaĉoj estas ne malpli konkuremaj inter si... Sed tiuj elektronoj kaj protonoj estas verŝajne tre malgrandaj »onoj«?

RAD. Certe! Elektrono pezas nur $8.10(28)$ da gramo. En la atomo de hidrogeno estas nur unu protono, ĉirkaŭ kiu turniĝas unu elektrono. Sed la atomoj de aliaj korpoj estas pli komplikaj kaj havas iafoje kelkcentojn da protonoj kaj elektronoj.




Fig. 1. — Jen estas la ĝenerala konsisto de atomo. En ĝia centro troviĝas grupo da protonoj kaj da elektronoj (tie ĉi kvar rondetoj kaj du kvadratetoj). Ili estas la kerno de la atomo. Ĉirkaŭ tiu kerno turniĝas elektronoj (tie ĉi du kvadratetoj), je diversaj distancoj, laŭ la vojoj montritaj per punktlinioj.

AGADOJ DE LA VERDAJ SKOLTOJ

Hej, jen tre tre resuma raporto pri la agadoj de la Verdaj Skoltoj dum la lastaj monatoj. Pli da informoj, detaloj kaj fotoj vi trovos ĉe nia retejo www.verdajskoltoj.net

Kiel vi certe scias la Verdaj Skoltoj estas grupo por adoleskuloj ĝis 18 jaroj. La unua semajnfino okazis en novembro 2012, partoprenis 8 junuloj. Sekvis 3 jaroj plenplenaj da eventoj kun pinto en julio 2015: la kun-organizado de la Infana Internacia Kongreseto en Villeneuve-d'Ascq. IIK estis tre sukcesa: pli ol 40 infanoj el la tuta mondo partoprenis ĝin.

Sed, ĉar la skoltoj foriras kiam ili iĝas 18 jaraj, ni devas konstante varbi por ke la grupo travivas. Ni multe provis tion en 2015, sed sen sukceso. Rezulte en septembro 2015 restis nur tri skoltoj: Thomas el Bruĝo, Pjotr el Antverpeno kaj Lila el Bruselo.

Pro tio ni planis Esperanto-staĝon en novembro kiun ni nuligis pro manko da partoprenantoj. Ni reproviz tion dum la paskaj ferioj en Bouillon. Estis eta sukceso. Bonŝance en aprilo dum PEKO 2016 ni sukcesis allogi kaj varbi la genepojn de Jean-Pol kaj Frank el Nederlando.

Dank'al tio ni povis starigi bonegan standon dum La Semo en julio. Por la unua fojo ni havis grandan internacian teamon en nia budo. Kaj ni bone reklamis pri Esperanto. Bedaurinde ni ne varbis novulojn. Kaj fine de aŭgusto, ni organizis biciklan tendumadon de La Calamine al Kruikebe kun 10 partoprenantoj. Pri tio vi jam legis en tiu revuo.

En septembro ni parte partoprenis la Beneluksan Kongreson.

Fine de septembro, ni organizis semajnfinojn en Rosée : memkuiri, ludi, lerni Esperanton, lignokonstrui kaj provi la malnovan kaj malstabilan flosan sur la lageto. Estis tre amuza semajnfino.

Fine de oktobro ni partoprenis KKPSn en Delft, Nederlando. Tie, la Verdaj Skoltoj estis la solaj belgoj! Sed ni multe impresis la aliajn partoprenantojn. Kaj ni oficialigis nian kunlaboradon kun NEJ.

Fine de novembro, ni organizis semajnfinojn en Bruselo. Ni tie invitis la lernantojn de Sandra Schenkel (ŝi instruas Esperanton al 14 jaruloj en Tervuren). Bedaurinde neniu el ili venis. Tamen la semajnfino estis amuza kun granda ludo, kinejo, kaj ni iris kune aĉeti niajn skoltajn ĉemizojn!

Kiel vi legas, la Verdaj Skoltoj daŭre vivas ! Estas eta grupo kun 6 skoltoj kaj 3 skoltestroj. Tamen estas vere malfacile varbi adoleskulojn. Necesas multe da laboro, mankas tempo, mono kaj homforto por pli sukcesi.

Ni estas kelkaj kiuj vere kredas en tiu projekto. Ni pensas ke ĝi estas ege grava por la Esperanto-movado.

Unue ĉar junuloj estas nia estonteco (ja ne plu estas junulara Esperanto-asocio en Belgio).

Due ĉar preskaŭ ĉiuj Esperanto-aktivuloj lernis nian lingvon kiam ili estis junaj adoleskuloj.

Se ni volas "produkti" aktivulojn, ni devas proponi ion al adoleskuloj!

Trie ĉar la Verdaj Skoltoj kaj PEKO estas bonega reklamo por relanĉi la Esperanto-movadon. Sekve al PEKO 2016, Viviane Tits kaj Valère prezentis nian lingvon en Tilff apud Lieĝo. Kaj tuj ekis kurso tie. Viviane kaj Valère instruas ĉiun vendredon. Valère ankaŭ sukcesis lanĉi kurson en bazlernejo apud Namuro kun 13 lernantoj (ĉefe 9 jaraĝuloj). Françoise kaj Valère denove partoprenis Excel'Langues en Libramont (en novembro) kaj fulminstruis Esperanton al pli ol 200 infanoj. Mirinda, ĉu ne?

Kvare, projekto kun adoleskuloj el ĉiuj regionoj de Belgio kaj el la apudaj landoj estas bonega reklamo por Esperanto-movado. Ni sukcesis rilati kun Arte, kaj kun jutubisto dank'al tio!

Do se vi kredas en Esperanto kaj en la valoroj de la Esperanto-movado, subtenu nin! Proponu vian helpon, donacu monon, partoprenu PEKOn 2017!

Valère



Printempa Esperanto Kunveno. 24a-26a de marto 2017 Amougies, Belgio

Ekde 2010, PEKO estas LA Esperanto-renkontiĝo en Belgio: internacia dank'al la partoprenado de multaj Flandroj, Valonoj, Bruselanoj kaj eksterlandanoj, profesie organizita, malfermita al ĉiuj, kaj kun bonegaj manĝoj.

Tiel kiel por la antaŭaj PEKOj ni preparas ampleksan kaj mojosan programon: Esperanto-kursoj diversnivelaj, faka seminario, diskoteko, promenadoj, ekskursoj, prelegoj, manlaborado por infanoj (kaj aliaj), libroservo de FEL, ktp.

Kaj unika bier-ateliero: lernu kiel fari bierojn en via kuirejo!

**PEKO 2017 okazos en Amougies, Belgio (inter Bruselo kaj Lille)
Ekde vendredo la 24a ĝis dimanĉo la 26a de marto**

Informoj kaj aliĝiloj ĉe www.verdajskoltoj.net/peko

INFORMOJ PRI ESPERANTO

BELGA ESPERANTO FEDERACIO (BEF)

Prezidantino : S-ino Flory WITDOECKT (Oostende) 059 702 914 flory2@witdoeckt.be
Sekretario : S-ro Claude GLADY (Cerfontaine) 071 644 916 cglady@arcadis.be
Kasisto : S-ro Eric BAERT (Braine L'Alleud) 02 384 82 23 baert.eric@skynet.be

BEF (Defakta Asocio) estas kupola federacio, agnoskita far UEA, por la tri belgiaj regionaj grupoj : APE, FEL, EBG.

ASOCIO POR ESPERANTO (APE) Asbl

Honora Prezidanto : Marcelle DELFORGE 071 431 413 mardelforge@brutele.be
Prezidanto : Georges SOSOIS 071 436 205 georges.sossois@gmail.com
Sekretariino : Bernadette PONCELET 087 398 570 bernadetteponcelet@skynet.be
Kasisto : Claude GLADY 071 644 913 cglady@arcadis.be
Eventoj : Valère DOUMONT 0485 517 552 doumontvalere@yahoo.fr
Promocio Eo : Hubert DEMEYERE 071 502 691 hubert.demeyere@gmail.com
Interreto : Patrice VAN DE VELDE 0478 251 419 patrice.vdvelde@gmx.com
Disvastigado : Guy BASYN 010 688 282 guy.basyn@skynet.be

FLANDRIO : FLANDRA ESPERANTO LIGO (FEL) vzw

Lange Beeldekensstraat 169 (2060 Antwerpen) 03 234 34 00
info@fel.esperanto.be www.esperanto.be

FEL eldonas la paperan revuon « HORIZONTALAAL » kaj la retan « VERTIKALE ».

BRUSELO : ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO (EBG) asbl/vzw

Françoise PELLEGRIN (Rhode-St-Gebèse) 02 358 27 28 franaz@esperantobruselo.org
Nikolao de BUYL (Koekelbergh) 0478 382 981 nikolao@esperantobruselo.org
Laurent LOISSE sekretario@esperantobruselo.org www.esperantobruselo.org
La Grupo eldonas la revuon « AKTUALA » : <https://sites.google.com/site/ebgaktuala/>

VERDAJ SKOLTOJ asbl.

[www.verdajskoltoj.net]

info@verdajskoltoj.net

Jean-Pol SPARENBERG Prezidanto 0475/27 23 19 jpsparenberg@gmail.com
Valère DOUMONT Sekretario 0485/51 75 52 doumontvalere@yahoo.fr

Subteno al konto de V.S. : **BE25 9731 2584 2982** Ruelle de Thuin 20 B-6540 LOBBES

GROUPE DES CHEMINOTS : FERVOJISTOJ (BEFA)

Lucien DE SUTTER (BXL-Central) 058 501 825
Cours : 1er et 3ème mercredi, chaque mois de 13h30 à 16h00

INTERNACIAJ ORGANIZAJĜOJ - ORGANISATIONS INTERNATIONALES

UEA : Nieuwe Binnenweg 176 NL-ROTTERDAM +31 10 436 1044 www.uea.org
SAT : Av. Gambetta, 67 FR-75020 PARIS +33 9 50 71 01 97 www.satesperanto.org
SAT-AMIKARO : Bd Vincent Auriol, 132 FR-75013 PARIS +33 9 53 50 99 58 www.esperanto-sat.info/

Ĉiuj informoj (en franclingva Belgio por UEA) ĉe la peranto Claude GLADY :
rue du CULOT, 1 BE-5630 CERFONTAINE 071/644 916 cglady@arcadis.be

INFORMOJ PRI ESPERANTO EN VALONIO

CHARLEROI : KARLOREĜA GRUPO ESPERANTISTA (K.G.E)

Rudy COGNIAU (Châtelet) 0492 710 974
Mireille MARNETTE (Marcinelle) 071 324 733 marnette.mireille@skynet.be

LIEGE-ESPERANTO asbl

Denise MAILLET (Embourg) 04 365 15 23 denise.dupont@skynet.be

LOUVAIN-LA-NEUVE : « KVINFOLIO » asbl

André DEMARQUE (Wavre) 0486 516 085 ademarque@skynet.be

VIRTON : GAUME ESPERANTO

Gaby SIMEON (Saint-Mard) 063 571 204

SENLIME + VERVIERS (V.E.G)

Jean-Marie JACQUES (Verviers) 087 330 292 jacques@senlime.org
Jose JACOB (Polleur) 087 221 079

KELMIS (LA CALAMINE) : « AMIKEJO »

Mathieu SCHRYMECKER (La Calamine) 087 853 389

AUTRES VILLES WALLONNES - ALIAJ VALONAJ URBOJ

ATH Monique VAN ROY (Ellezelles) 068 542728
BINCHE Maxime LECHIEN (Vellereille) 064 337 826
CERFONTAINE Claude GLADY (Cerfontaine) 071/644 916 cglady@arcadis.be
COMINES J-C THUMERELLE (Warneton) 056 557 606 jcthum@gmail.com
GEMBOUX José VINCK (Gembloux) 081 613 016
MONS Edith COLAS (Saint-Symphorien) 065 313263
THUIN Jean-Pol SPARENBERG (Lobbes) 0475/272319 jpsparenberg@gmail.com

RETPAĜO - SITE INTERNET D'APE :

<http://esperanto-wallonie.be/>

Respondeculoj : <patrice.vdvelde@gmx.com> k <hubert.demeyere@gmail.com>

Por konsulti aŭ elŝuti ĉiujn lastajn Bultenojn EeM en formato A4 kaj pdf :

<http://esperanto-wallonie.be/eo/esperanto-en-marche-eo>

BIBLIOTHEQUE D'APE - BIBLIOTEKO

Respondeculo : Claude GLADY [Rue du Culot, 1 BE-5630 CERFONTAINE 071/644 916]

Vi povas mendi librojn al la RETBUTIKO DE FEL : http://www.esperanto.be/fel/but/lis_serchu.php

ASSOCIATION POUR L'ESPERANTO (A.P.E.)

COTISATIONS POUR APE EN 2017

- **MEM** : Pour être membre de APE : 10 €
- **BUL** : Pour recevoir les bulletins d'informations : 7 €
- **FAM** : Membre supplémentaire de la famille : 3 €

VIREMENT AU COMPTE IBAN : BE72 000 3258537 16 BIC: BPOTBEB1
de l'Association pour l'Espéranto (APE).

NB: Indiquer les raisons du versement. Exemple : MEM+BUL+2xFAM : 23 €

ABONNEMENT A LA REVUE « ESPERANTO-INFO » : 30 €

Vous pouvez payer directement au compte d'« ESPERANTO-INFO » (conseillé !)

Virement européen au compte IBAN: FR91 2004 1010 0811 9014 6B02 947

Indiquer : « NOM PRENOM pour Esperanto-Info adresse »

Vous pouvez aussi passer par le compte d'APE avec la mention « EoInfo »

Kodo	Universala Esperanto Asocio: UEA 2017		Ricevas
SA	Abono al la revuo "ESPERANTO" de UEA.	41 €	Revuon "ESPERANTO" sen membreco !
Kto	Abono al "KONTAKTO".	25 €	Revuon "KONTAKTO"
MJ	Membro UEA + "Jarlibro"	26 €	"JARLIBRON"
MJ-T	Membro kun Jarlibro ĝis 29 jaro inkl.	26 €	Revuon "KONTAKTO" kaj "JARLIBRO"
MA	Membro Abonanto (MJ + SA)	64 €	Revuon "ESPERANTO" kaj "JARLIBRO"
MA-T	Membro Abonanto ĝis 29 jaro inkl.	64 €	Kiel MA plus "KONTAKTO"
MG	Membro UEA+"Gvidlibro"	11 €	"GVIDLIBRO"
PT	Patrono de TEJO	78 €	la revuon "KONTAKTO" subteno al TEJO sen membreco
SZ	Societo Zamenhof	128 €	Mecenata subteno sen membreco.
DM	Dumviva membro de UEA (25xMA)	1.600 €	Dumviva MA

Bonvolu pagi al la konto de la peranto
por UEA-kotizoj en franclingva Belgio :

BE50 750-6373051-18

je la nomo de :

GLADY Claude Rue du Culot, 1
B-5630 CERFONTAINE

UZU LA KUNMETITAN ĜIRILON

BN: La "JARLIBRO" de UEA enhavas informojn kaj milojn da adresoj de UEA...

La "GVIDLIBRO" estas la "Jarlibro" sed sen la adresoj !

"KONTAKTO" estas la revuo de la junulara sekcio de UEA : TEJO

BN : Bonvolu nepre motivi vian ĝirilon per kodoj :

Ekzemple : MJ aŭ MA+Kto